# KATOLIKA SENTO

1 '72

rm



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

51a Jaro n° 1 Januaro 1972

# NOVJARO '72a

Dum okcidente falas la plenluno,
aŭroras oriente nova tago.
Prilumos kion leviĝanta suno
en nuna jaro tra l' senhalta vago?

Ĉu fine la homar' fariĝos saĝa,
kaj tute ĉesos l' interfrata lukto?
Ĉu, post l' efiko de agad' sovaĝa,
reproduktiĝos l' amikeca frukto?

En la animoj flamu pac' kaj amo,
faktoroj de serena trankvileco;
forestu tristo, viglu nur balzamo
de plena ĝojo por la homa speco.

Feliĉon kun prospero evolua
alportu la novjaro sepdekdua!

Luigi Minnaja

Romo, la 31an de decembro 1971a

MESAĜO DE LA PAPO por la tago de la paco 1972-a

Homoj de la penso!

Homoj de l' agado!

Homoj ĉiuj vivantaj en la jaro 1972-a!

Akceptu ankoraŭfoje nian inviton celebri la Tagon de la Paco!

Ni denove pensas pri la Paco, ĉar ni havas pri la Paco koncepton tre altan, tiun de bono esenca kaj fundamenta por la homaro en ĉi tiu mondo, nome tiun de la civilizo, de la progreso, de la ordo, de la frateco.

Ni kredas, ke la ideo pri la Paco estas kaj devas esti ankoraŭ reganta super la homaj okazaĵoj kaj ke ĝi fariĝas pli urĝa, kiam kaj kie ĝi estas kontestata de ideoj kaj faktoj kontraŭaj. Ĝi estas ideo necesa, ĝi estas ideo imperativa, ĝi estas ideo inspiranta. Ĝi polarizas la homajn aspirojn, la klopodojn, la esperojn. Ĝi havas en si celon; kaj, kiel tia, ĝi estas ĉe la bazo kaj ĉe la fino de nia aktiveco ĉu individua, ĉu kolektiva.

Tial ni pensas, ke estas treege grave havi pri la Paco ideon precizan, senigante ĝin je pseŭdo-konceptaĵoj, kiuj tro ofte ĝin vestas, deformante, falsante ĝin. Tion ni diros antaŭe al la junuloj: ne estas la Paco iu kondiĉo stagnanta de la vivo, kiu trovas en ĝi, samtempe, kaj sian perfektecon kaj la morton: la vivo estas movo, estas kresko, estas laboro, estas penado, estas konkero.... Ĉu la Paco estas tia? Jes, pro la fakto mem, ke ĝi koincidas kun la supera bono de la homo iranta en la tempo, kaj ĉi tiu bono estas neniam komplete konkerita, sed ĉiam survoje al nova kaj neelĉerpebla posedo: la paco, pro tio, estas la ideo centra kaj mova de la plej aktiva fervoro.

Sed tio ne signifas, ke la Paco koincidas kun la forto. Tion ni diros speciale al la homoj respondecaj, ĉar

por ili, al kiuj estus intereso kaj devo konservi normalecon de rilatoj inter la membroj de iu difinita grupo (familio, lernejo, entrepreno, komunumo, socia klaso, urbo, ŝtato), estas konstanta la tento altrudi per la forto tian normalecon de rilatoj, kiu akiras la aspekton de la Paco. Tiam la ambigueco de la homa kunvivado fariĝas la turmento kaj la korupto de la homaj spiritoj, kaj montriĝas hipokriteco travivita la atmosfero rezultanta iufoje el senglora venko, alifoje el despotismo neracia, el subpremo sufoka kaj ankaŭ el ekvilibro de fortoj ĉiam kontrastantaj kaj kutime kreskantaj en atendado de fortega eksplodo, kiu pruvas, per ĉiuspecaj ruinoj, kiel estas falsa la Paco altrudita per la nura supereco de la potenco kaj de la forto.

La Paco ne estas insido. La Paco ne estas mensogo fariĝinta sistemo. Des malpli ĝi estas tiraneco totala kaj senkompata, nek absolute perforto; sed almenaŭ la perforto ne aŭdacas alpropriĝi al si la respektindan nomon "Paco".

Estas malfacile, sed estas nepre necese formi al si la koncepton aŭtentikan pri la Paco. Malfacile por tiu, kiu fermas la okulojn al sia unua intuicio, kiu diras al ni, ke la Paco estas aĵo profunde humana. Ĉi tiu estas la bona vojo por alveni al la malkovro sincera de la Paco: se ni serĉas, el kie ĝi vere devenas, ni rimarkas, ke ĝi enprofundigas siajn radikojn en la sinceran senton de la homo. Paco, kiu ne rezultas el la vera kulto de la homo, ne estas ĝi mem vera Paco. Kaj kiel ni nomas ĉi tiun senton sinceran de la homo? Ni nomas ĝin Justeco.

Kaj ĉu la Justeco ne estas senmova diino? Jes, tia ĝi estas en siaj esprimoj, kiujn ni nomas rajtoj kaj devoj kaj kiujn ni kodigas en niaj famaj kodoj, nome en la leĝoj kaj en la paktoj, kiuj produktas tiun stabilecon de rilatoj sociaj, kulturaj, ekonomiaj, kiujn ne estas permesite rompi: ĝi estas la ordo, ĝi estas la Paco. Sed,

se la Justeco, nome tio, kio ĝi estas kaj tio, kio ĝi devas esti, ĝermigus aliajn pli bonajn esprimojn ol tiuj aktualaj, kio okazus?

Antaŭ ol respondi, ni demandu nin, ĉu ĉi tiu hipotezo, nome tiu de evoluo de la konscio pri la Justeco, estas allasebla, estas probabla, estas dezirinda.

Jes.

Ĉi tiu estas la fakto, kiu karakterizas la mondon modernan kaj distingas ĝin de tiu aktikva. Hodiaŭ la konscio pri la Justeco progresas. Neniu, ni kredas, kontestas ĉi tiun fenomenon. Ni ne haltas nun por fari ĝian analizon; sed ni ĉiuj scias, ke hodiaŭ, dank' al la disvastigo de la kulturo, la homo, ĉiu homo havas pri si novan konscion. Ĉiu homo hodiaŭ scias, ke li estas Persono, kaj Persono li sin sentas. Tio estas, estaĵo netuŝebla, estaĵo egala al la aliaj, estaĵo libera kaj respondeca, ni eĉ diru, estaĵo sankta. Sekvas, ke eksento malsama kaj pli bona - tio estas pli plena kaj postulema - pri la diastolo kaj la sistolo de lia personeco, ni volas diri pri lia duobla morala movo de rajto kaj devo, plenigas la konscion de l' homo, kaj Justeco ne plu statika, sed dinamika naskiĝas el lia koro. Ĝi ne estas fenomeno simple individua, nek rezervita nur al grupoj elektitaj kaj limigitaj; ĝi estas fenomeno jam kolektiva, universala; la evoluantaj Landoj ĝin krias per laŭta voĉo; ĝi estas voĉo de Popoloj, voĉo de la homaro; ĝi postulas novan esprimon de la Justeco, novan bazon por la Paco.

Kial, do, konvinkitaj kiel ni ĉiuj estas pri ĉi tiu nerefutebla aserto, ni perdas la tempon por doni al la Paco alian bazon, kiu ne estas tiu de la Justeco?

Kiel estis emfazite de la lasta Asembleo de la Episkopa Sinodo, ĉu ne estas ankoraŭ starigenda pli granda justeco tiel en la naciaj komunumoj kiel sur internacia plano?

Ĉu estas juste, ekzemple, ke ekzistas tutaj popoloj, al kiuj ne estas konsentita la libera kaj normala esprimo de la plej ĵaluza rajto de la homa spirito, nome tiu religia? Kia aŭtoritato, kia ideologio, kia intereso historia aŭ civila povas arogi al si subpremi, sufoki la religian senton en ĝia legitima kaj homa (ni ne diras superstiĉa, nek fanatika, nek ribeliga) esprimo? Kaj kian nomon ni donos al la Paco, kiu pretendas trudiĝi surtretante ĉi tiun unuan Justecon?

Kaj tie, kie aliaj nediskuteblaj formoj de Justeco, nacia, socia, kultura, ekonomia... estus ofendataj aŭ vundataj, ĉu ni povus esti certaj, ke estas vera Paco tiu, kiu rezultas de tia perforta procedo? ke ĝi estas stabila? Kaj, eĉ se stabila, ke ĝi estas justa kaj humana?

Ĉu ne partoprenas en la Justeco la devo meti ĉiun Landon en kondiĉon stimuli sian evoluon en la kadro de kunlaborado ne havanta iun ajn intencon aŭ kalkulon de superregado ekonomia aŭ politika?

La problemo fariĝas ekstreme grava kaj kompleksa; kaj ne estas nia tasko ĝin akrigi, nek ĝin solvi praktike. Pri ĝi ne estas kompetenta tiu, kiu parolas el ĉi tiu Apostola Sidejo.

Sed ĝuste el ĉi tiu Sidejo nia invito al la celebrado de la Paco sonas kiel invito al praktikado de Justeco. "Opus justitiae pax" (La ago de la justeco estas la paco). Ni ĝin ripetas hodiaŭ per formulo pli tranĉa kaj dinamika: "Se vi volas Pacon laboru por la Justeco".

Ĝi estas invito, kiu ne ignoras la malfacilaĵojn por praktiki la Justecon, por ĝin difini, antaŭ ĉio, por ĝin efektivigi poste, kaj neniam sen iu ofero de sia prestiĝo kaj de sia profito. Verŝajne estas necese pli da grandanimeco por cedi al la pravoj de la Justeco kaj de la Paco, ol por lukti kaj trudi sian rajton, aŭtentikan aŭ supozatan, al la kontraŭulo.

Kaj ni tiom fidas, ke la idealoj kunigitaj de la Justeco kaj de la Paco kapablas, per propra virto, naski en la moderna homo la moralajn energiojn por ilia efektivigo, ke ni atendas ilian laŭgradan venkon. Eĉ ni estas pli fidoplenaj, ke la moderna homo havas jam, per si mem la komprenon pri la vojoj de la Paco, tiel ke li fariĝas mem iniciatanto de tiu Justeco, kiu malfermas tiujn vojojn kaj ilin laŭirigas kun arda kaj profeta espero.

Jen kial ni kuraĝas, ankoraŭfoje, lanĉi la inviton celebri la Tagon de la Paco, kaj en ĉi tiu jaro 1972-a ni tion faras en la signo severa kaj serena de la Justeco, nome en la varma deziro vivigi agojn, kiuj konverĝe esprimu sinceran volon de Justeco kaj sinceran volon de Paco.

Al la Fratoj kaj Filoj de nia katolika Eklezio ni rekomendas ĉi tiun inviton nian: estas necese porti al la hodiaŭaj homoj mesaĝon de espero, per frateco travivita kaj klopodo honesta kaj konstanta por pli granda reala Justeco. Nia invito kunligiĝas logike kun la deklaro de la lasta Episkopa Sinodo pri la "Justeco en la mondo"; kaj ĝi akiras sian forton el la certeco ke "Li, Kristo, estas nia Paco".

la 8-an de decembro 1971-a

---

LAŬ SUGESTO de niaj s-anoj ni volonte ŝanĝis la italan titolon de nia roma bulteno, kiu ĝuste centfoje aperis kiel: "Centro Esperantista Cattolico Romano" en la novan: "Roma Esperanta Voĉo". Fakte la bulteno iom post iom evoluis el modesta informilo por romaj samideanoj, al pli ĝenerala informilo por katolikaj esperantistoj, ne nur romaj, pri la eklezia vivo kaj agado.

---

# ROMA ESPERANTA VOĈO
## nº 101

EL LA ROMA GRUPO. - La 19-an de decembro, en la kunvenejo de Roma Katolika Esperanto Centro kaj antaŭ multenombra publiko, S.ro Luigi Minnaja memorigis la 112-an datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko Lazaro Zamenhof. La oratoro skizis interesan paralelan historion de la vivo, de la malfacilaĵoj kaj de la sukcesoj de Zamenhof kaj de lia kreitaĵo, la internacia lingvo esperanto. Estas konate, ke Zamenhof pripensis almenaŭ du aliajn projektojn de internacia lingvo, antaŭ ol decidiĝi pri tiu formo, kiu estas konata sub nomo "Esperanto"; kaj la unua el tiuj projektoj, la " Lingvo universala" ,estis "lanĉita de la juna Ludoviko ĝuste en decembro, en tiu monato, kiu ludas gravan rolon en la historio de nia movado: la 15-an de decembro 1859-a naskiĝis Zamenhof, kaj la 17-an de decembro 1878-a naskiĝis oficiale "lingvo internacia", en kiu areto da amikoj kantis himnon al homa frateco: "Malamikete de las nacies, kadò, kadò, jam temp'està..." (malamikeco de la nacioj, falu, falu, temp'estas jam). Sed post tiu junula entuziasmo, venis amara seniluziiĝo; lia kreaĵo estis akceptita per malicaj opinioj kaj mokoj, kiuj kaŭzis severecon de la patro kaj malpermeson al la filo plu laŭiri tiun vojon. Sed de tiam komenciĝis interne de Ludoviko la plej turmenta lukto, la plej akraj suferoj, travivitaj en malgaja silento, dum li per streĉitaj fortoj obstine klopodis por perfektigi sian kreaĵon. Datumas de tiu epoko iu pra-formo de esperanto, en kiu Zamenhof verkis, interalie, en la jaro 1882-a, poemeton titolitan "Penso", en kiu li kantas: "Belan vesperon ekster la urbeto/ malproksime nenio bruas / kaj en la rondo unu

knabineto/ dolĉe deklamas./ Kaj pri vivo detruita/ sente ŝi paroladis,/ kaj mian vundon nekovritan/ senscie incitadis". Ĉu vera rakonto, aŭ ĉu pli vere Zamenhof intencis simboligi, en tiu knabino, sian ĉagrenplenan esperon? Tre probable, kiam Zamenhof verkis tiujn versojn, li jam estis pensinta pri la espera programo kaj pri sia pseŭdonimo Doktoro Esperanto; tion supozigas ankaŭ la fakto, ke en la "Unua libro" la unua poeziaĵo preskaŭ laŭvorte ripetas la unuajn versojn de la citita poemo: "Sur la kampo, for de l' mondo/ antaŭ nokto de somero,/ amikino en la rondo/ kantas kanton pri l'espero./Kaj pri vivo detruita/ ŝi rakontas kompatante../ mia vundo refrapita/ min doloras resangante." Kun la ŝarĝo de tiuj suferitaj travivaĵoj, Zamenhof lanĉis sian novan, facilan lingvon, en la jaro 1887-a, kaj kun ĝi la "internan" pacigan ideon, kaj la esperon pri estonta mondo pli bona. En novembro 1891-a, ĝuste en Romo, okaze de la tria Kongreso por la paco, sonis unuafoje la poemo de Zamenhof "La espero", kiu sinteze ampleksas tutan programon, kaj fariĝis poste la himno de la esperantistoj. Pasis la jaroj, tra pluraj malfacilaĵoj kaj eĉ turmentoj en la reformema periodo; sed fine venis la triumfo de la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-mer. Bedaŭrinde, kelkajn jarojn pli poste, kiam plej kruele furiozis la unua mondmilito, la nobla koro de Zamenhof, frapita de tiel ŝira doloro, haltis por ĉiam. Finiĝis la milito kaj revenis la paco; refloris la esperanto-movado, kiu ĉiujare memorigas la grandan bonfarinton de la homaro, kaj el tio tiras novan instigon por daŭre antaŭenpuŝi la esperan programon de la iniciatinto de la internacia lingvo.

A.D.S.

## 15-a DE DECEMBRO

Dekkvina tago, lasta la monato.
Kial nun mense dolĉas rememoro?
Ĉar estas memorinda tiu dato:
de Esperanto ekvivis l'aŭtoro.

En norda frida pola regiono,
humile, laŭ rakonto de l' kroniko,
ĉe ligna dom' ekfloris la burĝono:
naskiĝis la talenta Ludoviko.

Li per helplingvo lanĉis idealon
interfratigan ĉe la homaj rasoj,
konkordan, humanecan vivmoralon,
tiel ke ĝuu pacon ĉiuj klasoj.

La vokon simpatie, noblasente,
akceptis fide familia rondo:
ĝi lernis l' idiomon diligente,
l' ideon diskonigis tra la mondo.

La ĝojan datrevenon historian
ni kune gaje festu, promesante
daŭrigi strebe plu agadon nian,
ĝis fina cel', fervore kaj konstante!

Luigi Minnaja

LA MUZIKA MAJSTRO HEKTOR BENDA aŭdigis afable al ni la diskon de sia "Sankta Meso" en Esperanto de li mem verkita kaj direktita en la ĉefpreĝejo de Princlando de Monako, okaze de la Federacia Esperanto-Kongreso de la 1969a. Li estas nun pretiganta ankaŭ la presitan partituron. Kun raviteco ni gustumis tiun belegan "meson", des pli ke ni ne havis la ŝancon partopreni en la priparolita kongreso. Por ricevi la diskon, oni petu

de: Hector Benda, 66 bis, Avenue de la Californie; Nice; Francujo.

SAC. D.ro JAN FILIP, 60-jara, estis abrupte forprenita el la surtera vivo la 21-an de novembro 1971a, dimanĉe, dum li pretiĝis por la sankta meso. Donis al ni la funebran anoncon Jozef Ĉihak. Tio estis tre grava perdo por la katolikaj ĉeĥaj samideanoj, ĉar sac. Jan Filip estis unu el la plej valoraj esperantistoj en sia lando. Li estis ankaŭ nia afabla helpanto en la traduko kaj la revizio de la mestekstoj, kaj nia fervora aliĝinto. Li esperantistiĝis jam ekde sia 15-jaro, estante studento de gimnazio. En 1929a aperis liaj unuaj libroj: "Kantareto" eldonita okaze de la 15a internacia kongreso de IKUE en Praha; kaj "Granda Vortaro Esperanto-Ĉeĥa", libro kun 410 paĝoj. Ĝi estis reeldonita post la dua mondmilito kun la "Granda Vortaro Ĉeĥa-Esperanta", impona libro kun 654 paĝoj. Li verkis ankaŭ teatraĵojn kaj dramojn ("Fino de la mondo"; "La turo inter nuboj") ankaŭ muzikitajn; krom multaj poeziaĵoj, aperintaj en pluraj gazetoj en la esperanta kaj en la ĉeĥa lingvoj. Al liaj amataj gefratoj Karlo kaj Karla, kiuj multe kunlaboris kun la forpasinto, ni esprimas kun la humila preĝo al Dio por lia fervora servanto, niajn sincerajn kondolencojn. Ni volas memore de li transkribi el "Informilo" (decembro 1971) de la IKUE-Sekcio de ĈEA la belan poeziaĵon, aperintan nur kelkajn tagojn post lia morto, verkitan kiel kanton de la lasta tendarfajro en la somera Esperanto-tendaro en Herbortice:

1

En malluma noktomaro
brulas fajra heliant'.
De l' tendara gefrataro
adiaŭa sonas kant'.

2

En la kor' la idealo
en la man' l'amika man',
en okula ros-vualo
flagras la fajrer-fontan'.

3

Luno, steloj malaperos
dum tagiĝo de l' aŭror".
Tamen ĉiam plu fajreros
arda stel' en mia kor'.

4

Brilu kiel diamanto,
fajro de l' gefrata sent',
kiun ni per Esperanto
portas al homara gent'.

5

En la peno altencela
eĥas voĉ' de Betlehem'.
Ni fariĝu ĥor' anĝela
por la paco per kompren'.

6

Tra malluma mondospaco
brulu fajre nia am'.
Iru ni kun dia paco
en konkorda akompan".

ALIĜIS AL UECI-REV (Roma Esperanta Voĉo) por 1972a (3a listo): Romo: J. Christiaens; M. Canevari; N. Pagliari; A. Menabene; Z. Carrubba; A. Signore; L. Senes; E. Puracchio; E. Migliorini; S. Rejnic; M. La Torre; B. Benassi; C. Farina; F. Venezia; R. De Angelis; D. Libutti; Bari: K.H. Renschler; Bolonjo: R. Maudente; G. Gimelli; IFEA; Cesena(FO): B. Benini; Florenco: O. Risaliti; Ghilarza(CA): E. Sias; Milano; G. Tanzi; F. Longoni; Napolo: T. Restaino; Parma: E-Grupo; Reggio Emilia: A. Fabbi; Rimini(FO): A. Ciccanti; Savigliano(CU): M. Mariano; M. Dogliani; Verona: A. G. Fontanive; Aŭstrujo: R. Kunert; K. Dürrschmidt; Belgujo: A. Beckers; Brazilo: T. M. Manzo; Britujo: N. Vigar; Ĉeĥoslovakio: J. Cichová; A. Dlugi; V. Karulová; J. Petrlik; J. M. Vecerová; Città del Vaticano; P. Coveney; Francujo: L. Goudé; Hispanujo; A. Olivares; Hungarujo: S. Balint; I. Nagy; T. Veszpremi; A. Szoboszlay; J. Dobos; Jugoslavio: R. Kralj; Z. Hag; Nederlando: L.H. Brans; C. Wijn; Pollando: B. Krzan; E. Jankowska; Z. Waradzyn; M. Skibowiecka; T. Nowakowski; Z. Klopocka; A. Mackiewicz; Sovetunio: M. Gylys; Stakevicius; J. Gediminas; - Entute: 165.

BONFARA KASO: 30.000 T.Veszpremi; 10.000 V.K. 5.000 E.Sias; 3.000 L.H.Brans; 2.000 E. Bugini ; R. Galeotti; 1.000 M. Canevari; P. Coveney; O. Risaliti. Doninte por kristnaska bonfaro 20.000, restas: 49.000. Kun plezuro ni rimarkas, ke nia B.K. ekde 1967a scipovis disdoni ĝis nun duonmilionon da liroj ; kaj precize: 150.000 por Pakistano (3 bovinojn); 100.000 por la inundoj de la sama lando; denove 50.000 en la pasinta oktobro. Kaj 200.000 okaze de Pasko kaj de Kristnasko al bezonantaj s-anoj.
Dio benos la grandanimon de niaj legantoj!

KVANKAM ĈIUJ KOSTOJ ALTIĜIS ni ne volis altigi la aliĝkotizon de K.S., kiu restas ankoraŭ: £. 1.000 Ni esperas, ke tiel ĉiuj, kiuj abonis nian revuon en la pasintaj jaroj, renovigos tuj sian abonon; ĉar ni devos nepre haltigi la sendadon al ne-pagintoj.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribitan de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

---

El la Katolika Eklezio:

---

PROBLEMOJ RILATANTAJ la revizion de la kanona juro, aparte pri la familia juro kaj pri la proceduroj de la nuligaj procesoj estis reliefigitaj de la papo en la parolado adresita al partoprenantoj en "Kurso por renovigo de la kanona juro", iniciate de la "Gregora Uni-

versitato", okaze de aŭdienco al ili donita en la tronsa lono. Salutinte docentojn kaj lernantojn de la kurso, Paŭlo VI substrekis la gravecon de la iniciato, kiu celas respondi al la evoluneceso de la kanona juro, kiel homa pozitiva juro. "Hodiaŭ - diris la papo - ĝi devas esti adaptita al la spirito de la IIa Vatikana Koncilo. Rilatante al kelkaj problemoj, kiuj devas esti inspiritaj al tiu sento, la papo menciis unue la geedzan juron, pri kiu oni devas enprofundigi la studojn de la geedza ligilo laŭ la doktrino de la Nova Testamento, de la Patroj kaj de la eklezia instruado. La papo invitis la ĉeestantojn ekzameni diligente la procedurojn por la geedziĝa nuligo, atentante la direktivojn de la freŝdata apostola dokumento: "Geedzaj procesoj", memorigante, ke la IIa Vatikana postulis, ke la personaj rajtoj de la kredantoj estu garantiataj. Ĉi tiu problemo estas ekzamenita per la dua sekcio de la plej alta tribunalo de la apostola signaturo, kreita per la konstitucio titolita: "Al la administrado de la tuta eklezio". Ĉe la fino de sia parolado la papo reliefigis, ke la kanona juro devas havi paŝtistajn celojn, tiel ke ĝi ne estu io apartigita de la homa vivkondiĉo, aŭ kontraŭa al la persona libereco, sed prefere kiel helpo donita al la kristanoj.

"LA UKRAJNA EKLEZIO ĉiam sentis neceson de kuniĝo kun la apostola Seĝo": tion emfazis kard. Slipyi, alta ĉefep. de Leopol: kaj ĉefo de la Ukrajna eklezio. Liaj vortoj estis aparte signifaj, post kiam el kelkaj voĉoj aŭdiĝis, ke la episkopoj de la ukrajna eklezio estis proksimaj al rompo disde Romo. Tiun okazon donis al la kardinalo, je la 25a de novembro, la festo en Sankta Petro de Sankta Josafato Kuncewycz, apostolo kaj martiro pro la unuiĝo de la ukrajna eklezio al la roma Petra katedro. De ok jaroj la roma ukrajna kolektivo kuniĝas preĝe dum tiu tago en S. Petro, apud la tombo de sia sanktulo. Ĉijare kard. Slipyi kuncelebris solenan

liturgion kune kun altaj reprezentantoj de la ukrajna e klezio. Dum la diservo, celebrita ĉe la altaro de S.Bazilo la Granda, la purpurulo en sia homilio memorigis mallonge pri la ukrajna eklezia historio. "La ukrajna eklezio - akcentis la kardinalo - ĉiam sentis la neceson de unueco kun la Roma Seĝo". Li citis la klopodojn faritajn ĉefe de la ukrajna metropolito de Kievo, kard. Izidoro dum la Florenca koncilo en la 1531a: kvankam tiu koncilo - daŭrigis la ukrajna kardinalo - ne donis la esperitajn rezultojn, estas signifoplene, ke la ukrajna episkoparo kunvenis tie, por renovigi sian fidelecan atestan al la papo. "Se ĉi tiu unuigo - diris kard. Slipyi - renkontis tiom da malfacilaĵoj dum la jarcentoj, la ukrajnaj episkopoj gardis sian devon ĝissange, kiel S. Josafato". Li konkludis, memorigante, ke antaŭ kelkaj tagoj la ukrajna episkoparo, kuniĝinte en Romo okaze de la konsekro de la ukrajna preĝejo, dediĉita al sanktaj Sergo kaj Bakko, renovigis la samajn fidelecajn kaj obeemajn sentojn al la papo kaj al la apostola Seĝo. La relikvoj de sankta Josafato, episkopo kaj martiro de la katolika ukrajna eklezio, estas honorigataj en S. Petro de la 25a de novembro 1963a, kiam Paŭlo VI partoprenis en la depono de la sanktula ostaro, post diversaj translokiĝoj el Ukrajno al pluraj eŭropaj urboj.

PRI SAC.JAKOBO ALBERIONE, mortinta la 26an de novembro, ni jam donis la anoncon en la decembra numero de KS. Laŭ la deziro de kelkaj niaj legantoj, ni aldonas ĉi tie novajn sciigojn pri tiu eminenta figuro. Paŭlo VI jam vizitis lin antaŭ lia forpaso kaj, kiam ĉi tiu okazis, sendis mesaĝon al la ĝenerala superulo de la "S. Paŭlo-kongregacio", sac. Luigi Zacconi, pere de sia ŝtata sekretario, kard. Villot. En la telegramo estis menciitaj la "valoraj ekzemploj, kiujn lasis post si la forpasinto, bona servanto de la eklezio kaj de la ani-

moj. Dio - daŭrigis la papa mesaĝo - akceptu la elektitan spiriton de tiu sacerdoto, kiu oferis sian tutan ekziston kiel ekzemplodonan servon al la eklezio". Sac. Jakobo Alberione mortis 87-jara, ĉar li naskiĝis la 4-an de aprilo 1884a el kamparana familio ĉe S. Lorenzo de Cuneo. Li estis ordinita sacerdoto en 1907a en la katedralo de Alba, kie li komencis sian paŝtistan agadon kiel parokestro de Narzole. Poste li estis spirita direktoro de la seminario kaj samtempe li sin dediĉis al la dioceza ĵurnalo "Gazeto de Alba", kies direktoro li fariĝis en la 1913a. La 20an de aŭgusto 1914a, por kontraŭstari al kelkaj tiutempaj pensdirektoj, ĉefe al modernismo, pere de gazetaro inspirita al la principoj de kristanismo kaj de fideleco al la papo, li metis la bazojn de la Societo S. Paŭlo, malfermante la tipografian lernejon "Malgranda Laboristo" kun tri lernantoj. La sukceso de la iniciato estis tiel granda, ke la preseejo, la postan jaron, devis transloĝiĝi al pli vasta loko. Dum la sekvantaj jaroj li starigis kvar virinajn institutojn (Filinoj de S. Paŭlo; Piaj disĉiplinoj de la dia Majstro; Paŝtistaj Fratinoj, kaj Apostolaj Fratinoj), al kiuj sekvis en 1958a tri sekularaj institutoj: Anoncitinoj, Gabrielinoj, kaj Instituto de Jesuo Sacerdoto. La "Paŭla" familio nombras pli ol ok mil membrojn; ĝi eldonas kvindekon da gazetoj (la plej disvastigita estas la itala semajna "Famiglia cristiana" kun preskaŭ 2 milionoj da ekzempleroj) kaj disponas pri cento da presejoj, dissemitaj tra la tuta mondo. Ĝia fundamenta celo estas apostolado pere de sociaj komunikiloj: televido, radio, diskoj, kino, gazetaro. La unuan radiofonian stacion sac. Alberione malfermis en 1952a en Japanujo; ses stacioj aktivas en Brazilo. La tensio kaj la misia spirito de Sac. Jakobo Alberione estas sintezitaj per ĉi tiu lia frazo: "Se la spacoj de la tradicia religia sento malvastiĝas, ni devas vastigi la spiritajn; se la

homoj ne iras al la preĝejo, ni devas aliigi al ĝi la lokojn, kien la homoj iras, kaj al pupitroj la komunikilojn, la familiajn salonojn, transistorojn, surdiskajn gravuraĵojn, la ĵurnalojn, ktp."

LA ISLAMA KULTURA CENTRO en Italujo direktis al la kristanoj belan mesaĝon, okaze de Kristnasko, kiu montras, kiom progresis la sento de nia frateco en la nomo de Dio. En la dokumento oni legas, interalie:"Ke nia frata bondeziro penetru en viajn korojn kaj en viajn domojn, partoprenigante nin en via ĝojo kaj nin intime unuigante al vi, per la kredo en unu Dio. Ĉi tiu kredo unika kaj firma kunigas nin kaj incitas nin al plia kaj plia interkono kaj interkompreno; kunigas nin en la luktado kontraŭ ateismo, maljusteco, subpremo kaj diskriminacio; fine invitas nin celi konstante justecon kaj pacon". Oni legas ankaŭ: "En ĉi tiu momento plena de malĝojo kaj necerteco, de malkonfido kaj malkuraĝiĝo, necesas pli ol iam fortigi tion, kio kunigas nin kaj efektivigi perfektan kunlaboron inter Islamo kaj Kristanismo, la du plej grandaj religioj en la mondo, por restarigi la respekton al la libereco kaj al homa digno". Kaj ĉe la fino la mesaĝo aldonas:"En ĉi tiu festa datreveno, ni pensu momente pri tiuj, kiuj suferas:pri la malriĉuloj, pri malsatuloj, persekutitoj, subpremitoj. Ni pensu pri la miloj kaj miloj da rifuĝintoj, kristanaj kaj muzulmanaj, fortrenitaj, renversitaj de ne homa, ne konceptebla tragedio, senigitaj de la plej fundamentaj kaj netuŝeblaj naturaj rajtoj. Kun la espero, ke ĉi tiu nia reciproka kaj frata amikeco estos premiso al universala frateco, ni renovigas al ĉiuj, en Oriento kaj en Okcidento, niajn plej sincerajn bondezirojn por la Kristnaskaj festoj".

CELE AL RESTARIGO DE KONTAKTOJ kun la Rodezia registaro, la brita ministro por eksterlandaj aferoj vi-

zitis la tieajn ekleziajn reprezentantojn. Pri la koncernaj interparoloj nur ĉi tion oni certe eksciis: ĉiuj kun absoluta decido sin deklaris nepre kontraŭaj al la rasisma politiko de la rodezia konstitucio, kiu sankcias la superecon de la blanka minoritato (285.000 personoj) kontraŭ la afrika popolo (5 milionoj). Unuarangan rolon en ĉi tiu sfero havas la katolika eklezio. La rodezia registaro konscias pri la malaprobo de la tutmonda opinio, kaj ne povante sin meti kontraŭ ĉiuj religiaj konfesioj, kio verŝajne pligravigus ĝian situacion, ĝi reprezalias per punagoj kontraŭ kelkaj izolitaj sacerdotoj, kiuj kulpas pri helpo al la negroj. Ĉi tiuj estas ne tolereble persekutataj; ili ne havas politikajn rajtojn, praktike eĉ ne eblecon de voĉdono; kiam kelkaj el ili sukcesis pliigi materiajn havaĵojn, domojn aŭ rikoltojn, dombestojn, ktp., ili estis laŭleĝe senigitaj pri ĉio, favore al la blankuloj. La leĝoj bojkotas ĉiujn helpojn de misiistoj por ili, sociajn, religiajn, kulturajn. Kaj tiuj misiistoj, kiuj rezistas kontraŭ tiu rasisma sinteno, estas konsiderataj kiel konspirantoj kontraŭ la ŝtato. Vere estas, ke la konstitucio difinas ankaŭ la temon de la atingo de la politika sinregado por la afrikanoj; sed la leĝoj estas tiel malhoneste aranĝitaj, ke tio povas okazi nur post multaj jaroj, por nova generacio. La kristanaj eklezioj estas kompakta fronto kontraŭ diskriminacio. La freŝdata kondamno al kvinjara enkarcerigo de la dekano de la anglikana eklezio de Johannesburgo, Gouville Frenc Beittag, ekscitis la ĝeneralan indignon. Nur lia apelacia peto evitigis ĝis nun la karceron. Dume la eklezioj klopodas pli decide laŭiri la vojon laŭiritan de la dekano, per helpoj al la negroj nome de la kristana sento. "Ni ne celas rektan kolizion kun la registaro - admonis mons. Robert Selby Taylor, ĉefep. de Kaburbo - sed ni ne ekskluzivas tion, se ni devus iri kontraŭ niajn religiajn kaj moralajn principojn". Mons. Lamont,

episkopo de Umtali en Rodezio, troviĝis en Londono ki am estis diskonigita la traktato inter Britujo kaj lia lando. Ĉar li estis unu el la plej malkaŝaj opoziciantoj al la Smith-a reĝimo, liaj komentoj vekas apartan intereson. Li montriĝis surprizita pro tiu traktato, ĉar "la brita registaro - li diris - estas ligita al la kvin principoj, kiuj enhavas progreson sen malhelpoj kontraŭ la leĝo de la majoritato, kaj abolicion de ĉiuj rasaj diskriminacioj. La rodezia registaro ĉiam montris sian rektan kontraŭecon al tiuj principoj. Ĝia konstitucio, ekzemple, en la 84a artikolo malpermesas eĉ al tribunaloj deklari ne valida iun leĝon, nur pro tio, ke ĝi estas kontraŭa al la homaj rajtoj. Sendube oni devis ambaŭflanke celi kompromisojn- diris la episkopo -. Sed ki u plimulte cedis? Oni starigis komisionon por pristudi la problemon de modifoj al la konstitucio. Sed la rodezia registaro antaŭmetis kondiĉon, laŭ kiu ĝi "ne akceptos proponojn, kiuj, laŭ ĝia prijuĝo, estas kontraŭaj al ĝia suvereneco". Malklara kaj elasta kondiĉo, kiu ŝajnas rajtigi rifuzon al ĉiu ajn propono kontraŭ tiu diskriminacio, kies celo estas gardo de la blankula regado.

AKCEPTANTE LA AKREDITITAN ambasadoron de Dahomeo, Laurent-Cyrille Faboumy, je la 10 de decembro, la papo reliefigis, ke la popolo de lia lando ricevis grandajn talentojn, kiel pruvas longa vico da intelektuloj, kies famo transpasas iliajn landlimojn, kaj ke la kristana kolektivo montras viglan aktivecon, kiu honoras la Dahomean ŝtaton. La papo aldonis, ke li volis inter la kunlaborantoj de la roma kurio reprezentanton de tiu loka eklezio, mons. Gantin, kiel agnoskon de la fruktoriĉa disvastigo de la katolikismo en tiu lando. Pro tio la papo en siaj salutvortoj invitis la katolikan eklezion de Dahomeo daŭrigi en fratamo kun la tuta popolo, helpante per ĉiuspeca karitata kaj socia agado al ĉiuj,

ĉefe al la malriĉuloj, al la suferantoj, cele al la paco, al klopodoj por justeco, al socia progreso.

LA KATOLIKA EKLEZIO EN KEBEKO, la franclingva provinco de Kanado, kun 5 milionoj da kredantoj, troviĝas en unu el siaj plej agititaj momentoj. Ĝi iam povis fieri pri sia stabileco, forto, penetremo en ĉiujn kampojn, precipe inter 1900a kaj 1960a. Sed abrupte ĝi eniris kvazaŭnovan eraon. Samtempe kiam ĝia kard. Leger demisiis, por reiri kiel misiisto de lepruloj al Kameruno. Kvankam similaj malfacilaĵoj renkontiĝas ĉe multaj aliaj landaj eklezioj, en Kanado verŝajne ili estas pli konsciataj. Temas pri malklerikizado, malkonfesiado, malkristanizado de la katolika komunumo, nur due verŝajne al la samaj suferoj de la eklezio en Nederlando. Vasta enketo enkondukita de la episkoparo por rekoni la kaŭzojn kaj trovi rimedojn, plenigas 520 paĝojn da raportoj pri 900 religiaj grupoj kaj parokoj, ducent horojn da surbenditaj intervjuoj kaj publikaj aŭdiencoj. Profesoro Fernad Dumond, de universitato Laval, iniciatinto de la enketo, rimarkas la realan gravecon de la malsano, sed konkludas, ke el multaj indicoj oni ekvidas iun celon en la novigo de multaj strukturoj, kio fine donos bildon sendube malsaman de la eklezio, sed ankaŭ pli spiritan. Pli kaj pli malkreskas la religia praktiko, sed la religia sento montriĝas pli forta, ol oni povus imagi. Ne estas sen signifo, ke multaj "bazaj" komunumoj ĉie estiĝas: tio montras, ke oni serĉas aŭtentikecon. Verŝajne oni alvenos al pli elastaj strukturoj, al pli granda libereco, sed ankaŭ al plia persona respondeco de la kristana vivo. Oni eksentas, kvazaŭ oni estas en la centro de iu ventokirlo. Oni povas samtempe vidi grandan nombron da pastroj kaj gereliĝiuloj, kiuj revenas al la sekulara vivo, eĉ se ne dramece, kaj multajn junulojn, kiuj sindediĉas al Dio. En la granda

seminario de Kebeko oni havis en septembro tridekon da novaj studentoj; 72 en Montrealo. Iom pli ol en la pasinta jaro, kvankam apenaŭ kvarono kompare al tiuj de antaŭ dek jaroj. Teologiaj gestudentoj en la universitato de Montrealo estas 450, krom 520 gereliĝiuloj, kiuj studas ĉe Kebeko. Oni devas ankaŭ ne preteratenti, ke la aktuala situacio devigis la reliĝiajn superulojn al pli severa kribrado de kandidatoj. Multaj vidas en ĉi tio esperan motivon pri la eklezia evoluo. Kio estos fakte en la estonteco, pri ĉi tiu Kebeka eklezio tiel turmentata? Ĵurnalisto de Montrealo donis ĉi tiun ekzemplon: " Kiam oni vizitas la ampleksegan preĝejon Saint-Joseph, la ruliĝantaj ŝtuparoj kondukas la fidelulojn ĝis interne de la baziliko. Antaŭe tia estis la eklezio. Ĝi portis la fidelulojn per ruliĝantaj ŝtuparoj. Hodiaŭ necesas lerni denove piediri, eĉ se kvazaŭ ŝanceliĝante, serĉante. Ni tamen certe alvenos. Ankaŭ en la pasinteco ni sukcesis".

LA "TAGO POR LA RIFUĜINTOJ" en Nordamerikaj ŝtatoj unue devis esti asignita al la 3a de oktobro, sed ĝi estis prokrastita al la 10a de oktobro, por ebligi pli efikan preparon. En Kanado Mons. William Power, vicprezidanto de la episkopa konferenco, direktis al ĉiuj episkopoj leteron, por substreki la gravecon de la iniciato kaj la demandojn, kiujn ĉi tio proponis al la konscienco de la mondo. Oni kolektis en Kanado unu milionon kaj 275.000 dolarojn (pli ol 750 milionoj da liroj), kiuj aldoniĝas al la aliaj jam ricevitaj de la Kanada Katolika Organizo por evoluo kaj paco ekde junio. La episkopa konferenco de Cejlono, kune kun la ĉefoj de la plej nombraj religiaj konfesioj, proklamis preĝtagon por la pakistana tragedio; kaj samtempe oni invitis kunigi ĉiujn fortojn por materiaj helpoj. Ankaŭ en Aŭstralio oni entreprenis, por respondi al la alvoko de la papo, multajn iniciatojn, kiuj interplektiĝis kun la aliaj

enkondukitaj de diversaj religiaj aŭtoritatoj kaj civilaj organizoj. Samtempe oni vekis la atenton de la plej dis-vastigitaj ĵurnaloj pri la vortoj de Paŭlo VI. La "Aŭs-tralian Catholic Relief" sukcesis tiamaniere doni rimar-kindan helpon. Ankaŭ la portugalaj ĵurnaloj estis noti-taj inter la plej aktivaj en la kampanjo.

LA MISIISTOJ DE LA "KONSOLITINO", kiuj laboras ĉe Boa Vista en Brazilo, sukcesis starigi malgrandan hospitalon meze de la indianoj de la alta Catrimani, en la centro de Amazono. La antaŭpretigitaj elementoj kaj la porsaniga ilaro estis transportitaj per riverboatoj.

HINDUJO NE SUFERAS PRO MANKO de vokiĝoj, kiel okazas ĉe multaj aliaj landoj dum nia tempo. La indikoj de la lasta "Katolika Direktivaro" montras notindan kre-skon kompare al la 1964a. En 1969a apud la 5.473 dio-cezaj pastroj, troviĝis 3.207 religiaj, el kiuj 2.411 hin-daj kaj 796 eksterlandaj, kun pliigo de 672 ĉe la unuaj kaj malkresko de 415 ĉe la duaj, kompare al 1964a. La nombro de la hindaj religiuloj pasis en la sama tempo de 1.665 al 1.794; la eksterlandaj de 332 al 342. La nombro de la hindaj religiulinoj kreskis de 21.558 al 28.298, dum la eksterlandaj malkreskis de 2.115 al 2.007. Kaj se oni komparas tiujn indikojn kun tiuj, ape-rintaj antaŭ dek jaroj, ni rimarkas pliigon de 82 % por la religiaj sacerdotoj, de la 64% por la diocezaj, kaj de la 72% por la religiulinoj. Oni ne antaŭvidas mal-kreskon dum la ĵus venontaj jaroj, ĉar estas notinda nombro da vokiĝoj en preparo: 3503 seminarianoj (1929 pliaĝaj kaj 1577 malpliaĝaj), 3124 religiaj studentoj kaj 3360 religiulinoj. Pasintiare, kiel ankaŭ nia bulteno ra-portis, leviĝis ĉe multaj kontraŭreligiaj medioj kampanjo kontraŭ ili. Oni eĉ parolis pri komerco de hindaj knabi-noj! La tujaj kontroloj de la civilaj kaj de la ekleziaj aŭ-

toritatoj montris la plenan falsecon de tiu kampanjo, eĉ, okazigis dankojn kaj laŭdojn al la eklezia agado. Laboras nun en Hindujo 33 reliĝiaj kongregacioj de sacerdotoj kun fratoj, 14 ekskluzive kun fratoj kaj 118 virinaj. Kelkaj kongregacioj hodiaŭ estas devene hindaj. La plej konata hodiaŭ estas la "Congregation of the Missionary Sisters of Charity" fondita en 1950a en Kalkuto de Patrino Tereza Bojaxhin, "pacpremio Johano XXIII" (v. K.S. n.3, paĝ.21, de 1971a). Ĝi posedas 30 domojn en Hindujo kaj 10 en aliaj landoj, por viroj kaj virinoj. Por akceli la progreson de la reliĝiaj kongregacioj estis starigita en 1961a la "Reliĝiulara Konferenco en Hindujo", kiu eldonas la revuon "En Kristo" kaj en 1964a la "Mater Dei-Instituto" por la teologia formado de fratinoj.

LA UNUA NUMERO DE NOVA REVUO pri religiaj informoj "Petrus" aperis lastatempe ĉe Nuzvid en Hindujo. Eldonas kaj direktas ĝin P. Johano Leoncini, de la papa instituto "Poreksterlandaj Misioj" kaj rektoro de la dioceza seminario S. Ambroso. La nova monata revuo celas diskonigi leterojn, mesaĝojn, instruojn de la papo kaj la aliajn gravajn dokumentojn de la eklezio. La iniciato ricevis varman laŭdon de la hinda hierarkio, nome de kardinaloj Gracias kaj Parekattil kaj de multaj episkopoj, kiuj tiel intencis substreki la neceson de informo pri la aŭtentika instruado de la Kristvikario en niaj tempoj tiel emaj al konfuzo pri religiaj principoj.

POST LA PAPA ALVOKO DE LA 10a de oktobro, tago de la solidareco por la viktimoj de la konflikto en la hinda subkontinento, multaj monrimedoj estis direktitaj rekte al la S. Seĝo aŭ al diversaj katolikaj helpentreprenoj. Oni povas kalkuli ilin laŭ pli ol 10 milionoj da doloroj (6 miliardoj kaj 100.000.000 da it. lir.). La S.Seĝo adresis ilin al la "Cor unum", la papa konsilio por la homa kaj kristana akcelo, kies prezidanto estas kard.

Villot, ŝtata sekretario. La konsilio konsistas el reprezentantoj de ĉirkaŭ 15 institucioj, laborantaj por helpo aŭ asisto, ĉefe al la subevoluinta mondo, kaj el personoj reprezentantaj la tutan dian popolon. Kvin departementoj de la Roma kurio havas tie delegitojn kaj ekspertizistoj.

RIMARKINDA ESTAS LA PARTOPRENO de la Ekumena Eklezia Konsilio en la helpo por la pakistanaj homamasoj, kiuj forlasis la okcidentan Bengalon. Laŭ la lastaj informoj "EEK" sendis pli ol 2.880.000 dolarojn (pli ol 1 miliardo kaj sep cent milionoj), krom grandan kvanton da varoj. La helpa organizo zorgas aldone pri 28 kampoj de rifuĝintoj.

ALDONE AL LA STATISTIKOJ pri la Sud-Korea eklezio en la septembra numero de KS. paĝ. 215-216,ni povas prezenti aliajn interesajn indikojn. El 31.460.000 loĝantoj, la katolikoj estas 788.082. Naŭ el la 13 diocezoj estas gvidataj de koreaj episkopoj. Krom la 883 sacerdotoj kaj 2.150 religiulinoj, laboras en la evangelia disvastigo 2634 instruistoj kaj 3225 katekistoj. La religia instituto, kiu havas la plej grandan nombron da sacerdotoj estas la kongregacio de Sankta Kolumbano (145 sacerdotoj), sekvata de la misiistoj de Maryknoll (52). Kaj inter la virinaj, unua estas la instituto de la Fratinoj de Sankta Paŭlo el Chartres (484 religiulinoj), sekvata de la "Servantinoj de la Sankta Koro (353). En la instrua kampo la eklezio direktas: 126 infanĝardenojn kun 7107 infanoj; 14 elementajn lernejojn kun 6619 lernantoj; 42 mezgradajn lernejojn kun 36.087 studentoj; 33 superajn lernejojn kun 22.324 studentoj; 10 profesiajn lernejojn kun 889 lernantoj, kaj 8 kolegiojn kun 4876 studentoj. En la socia kaj porsaniga sfero la eklezio administras 46 hospitalojn kun 2.070 litoj kaj 15

ambulatoriojn. Ĉe ili laboras 475 kuracistoj kaj 788 flegistinoj, kiuj ĉijare kuracis 522.689 pacientojn. Krome ekzistas ankaŭ 18 orfejoj kun 19.957 infanoj; 13 kadukulejoj kun 369 maljunuloj; 22 leprulejoj kun 2347 malsanuloj.

REPREZENTANTOJ DE LA KATOLIKA kaj de kvar protestantaj eklezioj subskribis en Bruselo intereklezian deklaron pri baptosakramento. "Montri, ke ĉiuj baptitoj estas kunigitaj per la bapto al la sama Sinjoro en unu korpo, signifas - akcentas la dokumento - inviti la belgajn ekleziojn daŭrigi studojn, dialogojn, kunlaboron pri ĉio, kio jam kunigas ilin kaj pri kio ankoraŭ disigas. La eklezioj tute ne celis - daŭrigas la dokumento - nur formalan kaj laŭjuran agnoskon, kio kondukus al deklaro, ke ĉiu bapto en ĉiu ajn eklezio estas valida. Ili intencis nur reliefigi la efikon de la bapto por la kristana vivo.

LA PORMISIA KOMISIONO DE LA episkopa jugoslava konferenco decidis relanĉon de misia mobilizo inter la katolikoj. La jugoslava katolika gazetaro estis invitita dediĉi al la problemo pli grandajn spacon kaj atenton. La pontifikaj misiaj entreprenoj estos denove starigitaj en ĉiuj diocezoj, kie ili mankas, kaj fonditaj en la aliaj, kie ili ne ekzistis. En la porpastraj seminarioj estis kreitaj misiaj sekcioj por la specialaj vokiĝoj de estontaj misiistoj. La klerikaro estis invitita aliĝi al la Misia Asocio.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us. dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari
aŭ pĝk al: 1-37638 - P.Giacinto Jacobitti

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo